



Vasilij Eroŝenko

**Unu paĝeto**  
**en mia lerneja vivo**

ĉinigis Guozhu

2010

I

Mi estas blinda, mi blindiĝis kiam mi estis kvar-aĝa. Kun larmoj kaj plendoj mi forlasis la regionon de l' belaj koloroj de l' brila sunlumo.<sup>1)</sup> Ĉu tio ĉi estis por bono aŭ malbono, mi ankoraŭ ne scias. La nokto daŭras longe kaj daŭros dum mi spiras.<sup>2)</sup> Sed, ĉu mi malbenas ĝin? Ne, certe ne. La fama blinda aŭtoro S-ro Hawkes<sup>3)</sup> en sia *The Hitting of the Dark Trail* diras: “La suno en tagmezo montris al mi la mondon kaj ĉiujn ĝiajn mirindaĵojn, sed la nokto montris al mi la universon, la sennombrajn stelojn kaj senliman spacon, la vastecon kaj mirindecon de la tuta vivo; la perfekta tago montris al mi nur la homan mondon, sed la nokto montris al mi la Dian universon. Kvankam la nokto alportis al mi doloron, tre ofte malkuraĝigon, tamen en ĝi mi aŭdis la stelojn kantantajn kune, kaj lernis scii la naturon kaj tra la naturo vidi la Dion de la naturo.”

我是一个盲人，打从四岁的时候就失明了。带着眼泪、怀着怨恨离开了色彩炫丽阳光明媚的缤纷世界<sup>1)</sup>。这究竟是件好事还是坏事呢，我

还是不知道。长夜漫漫，持续在我的有生之年。<sup>2)</sup> 我是否诅咒它呢？不，肯定不会。著名的盲人作家霍克斯先生 (S-ro Hawkes<sup>3)</sup> ) 在他的《黑暗的延伸 ( *The Hitting of the Dark Trail* ) 》一文中说：“正午的阳光向我展示了世界及其种种的奇妙之处，可是黑夜向我展示了宇宙，数不清的星星，无垠的空间，全部生命的广阔和令人赞叹；完美的白昼向我展示的只不过是人间世界，可是黑夜向我展示的却是上帝的宇宙。尽管黑夜给我带来痛苦，经常使我胆怯；然而在夜里我却可以听到星辰的合唱，学习着了解大自然，并且经由此见到大自然的上帝。”

Tiel diras S-ro Hawkes, kiu perdis unu piedon kiam li estis malgranda knabo, kaj kiu blindiĝis kiam li estis dekkvin-jara; per siaj rakontoj el vivoj de bestoj li fariĝis unu el la plej famaj natursciencistoj de Ameriko. Ĉu mi povas diri la samon? Se mi vivus kiel S-ro Hawkes inter la arbaroj en komforta belega domo ĉirkaŭita de multaj familianoj, eble tiam mi ankaŭ povus diri tion ĉi,<sup>4)</sup> sed sopirante ĉiam pri la naturo, mi devis ĉiam vivi en la bruego de tiaj urbegoj kiel Moskvo, Londono, Tokio k. t. p.

霍克斯先生就是这么讲的。当他还只是一个孩童时，就失去了一只脚，十五岁那年又瞎了双眼。可是，凭借着讲述的动物世界故事，他

成为了美洲最著名的自然科学家之一。我是否也能够讲同样的话呢？如果我也和霍克斯先生一样，生活在林间的舒服的豪宅里，置身于众多的家人环伺之中，也许我那时也能够讲这样的话。可是当我始终响往着大自然，却身不由己地总是处在像莫斯科、伦敦、东京等这样大都市的喧嚣声中。

En bruego de tiuj ĉi urboj la nokto ne igis min aŭdi la stelojn kantantajn kune, ĝi ne instruis al mi tra la naturo scii la Dion. Ĝi instruis al mi tute alion, sed pri tio mi nun ne parolos, mi rakontos nun pri tio, kion oni instruis al mi en la lernejo.

在这样一些大都会的喧嚣声中，黑夜不让我听到星辰的合唱，它也不教导我通过自然而认识上帝。它教给我的，完全是另外一些东西。不过我现在不谈这些。下面我只想谈谈，在学校里面我接受的是什么样的教诲。

Kiam mi estis naŭ-jara, oni sendis min al Moskvo por lerni ion en la blindullernejo. La lernejo estis fermita de la tuta mondo, la lernantoj estis permesitaj nek eliri ĝin por siaj aferoj nek iri eĉ la gepatran hejmon dum libertempo. Ni ĉiam estis sub la kontrolo de instruistoj. La instruistoj instruis al ni ke la tero estas granda kaj multaj homoj ankoraŭ povas trovi lokon por vivi sur ĝi. Nia amiko Lapin (la knabo de kunu-jara)

demandis: “Se la tero estas granda, kial do mia patro neniel povas havigi al si<sup>51</sup> eĉ malgrandan pecon da ĝi por kulturi kaj ĉiam devas lui ĝin de la Grafo Orlof?” La instruisto punis lin pro la malsaĝa demando; en nia klaso ni povis demandi al nia instruisto nur saĝajn demandojn. Post kelka tempo la instruisto demandis al Lapin: “Ĉu vi ne komprenas ke via demando estas malsaĝa demando?” Lapin ne povis ankoraŭ kompreni kaj li devis stari, ĝis li estis kompreninta la malsaĝecon de sia demando. Nur post duonhoru Lapin komprenis sian malsaĝecon kaj estis permesita sidiĝi.

我九岁那年，就被送往莫斯科，进盲人学校学习。这所盲人学校与外部世界是完全封闭隔绝的。学员被禁止因事外出，就连在课余时间也不许回父母家中。我们时刻都处在教师的监控之下。老师教导我们说，地球是很大的，许多人都可以在这里找到安身立命之处。

我有个朋友拉宾（他是个十一岁的男孩）提问道：“如果地球是很大的，为什么我父亲却总找不到一小块土地来耕种，而不得不总是要向奥尔洛夫（Grafo Orlof）伯爵老爷来租地呢？”拉宾因为提出了这种愚蠢的问题而受到老师的责罚。因为在我们班上只许向老师提聪明的问题。过了片刻，老师问拉宾：“难道你不知道，你的问题是愚蠢的吗？”拉宾还是

不明白自己错在哪里，于是老师让他罚站，一直要站到他明白自己的问题是愚蠢的为止。又过了半个小时，拉宾才晓得自己的愚蠢，这时才被准许重新坐下。

Post la leciono mi demandis al Lapin, en kio konsistas la malsaĝeco de lia demando, li diris ke li ne scias.

课后我问拉宾，他的问题蠢在哪里？他还是说不知道。

Mi redemandis: “Sed vi diris ke vi la malsaĝecon komprenis?”

“Mi komprenis ke estis malsaĝe stari kaj esti punita pro kia ajn demando”, respondis li.

我又问他：“可是，你不是说你已经晓得了吗？”

他回答道：“我晓得，为了提问而被罚站才是愚蠢的。”

La instruisto diris al ni ke homoj estas dividitaj en la rasoj, la blanka, la flava, la ruĝa, la nigra k. t. p. La plej civilizita kaj plej progresema raso estas la blanka, la malplej civilizitaj estas la nigra kaj la ruĝa.

老师对我们说，人分为不同的种族，有白种、黄种、红种、黑种……等等。其中白种人是最文明、最先进的，黑种、红种人则是最不开化的。

Lapin ekstaris kaj demandis: “Ĉu ni estas la plej civilizitaj kaj progresemaĵoj pro nia blanka koloro?” Alia knabo staris kaj demandis: “Kiam dum somero oni nigriĝas pro la suno, ĉu oni ankaŭ malciviliziĝas pro tio?” La instruisto diris ke ambaŭ demandoj estis malsaĝaj, kaj Lapin kaj la alia knabo devis stari, ĝis ili estis komprenintaj sian malsaĝecon. 拉宾突然站起来问道：“我们之所以最文明、最进步，是因为我们的皮肤有着白颜色吗？”另外一个孩子也站起来问道：“夏天的时候，我们的皮肤因为晒多了太阳而会变黑，那么会不会因此也变得不开化了呢？”老师说这两个问题都是愚蠢的，拉宾和那个提问的孩子两个人都被罚站，直到他们认识自己的愚蠢为止。

## II

Apud nia lernejo troviĝis la domo de S-ro Perlof. S-ro Perlof estis la estro de la plej fama tea kompanio, kiu enportas en Rusujon la teon<sup>6)</sup> en grandaj kvantoj el Ĉinujo. Unu fojon S-ro Perlof invitis al sia hejmo la faman ĉinan diplomaton Li

Hung-Ĉan.<sup>71</sup> S-ro Li, eksciinte ke nia lernejo troviĝis tute proksime de la domo de S-ro Perlof, nepre ekvolis viziti ĝin. S-ro Li Hung-Ĉan venis al nia lernejo en sia ĉina vesto kun harligo sur la kapo. Li estis tre afabla kaj permesis al ni tuŝi lian veston kaj la harligon ankaŭ.

我们学校的旁边，是彼尔洛夫（S-ro Perlof）先生的公馆。彼尔洛夫先生是一个最有名的茶叶公司的老板。他的茶叶公司每年都要从中国进口大量的茶叶运进俄罗斯。有一次，彼尔洛夫先生邀请了中国著名的外交官李鸿章到他家里作客。<sup>71</sup> 得知我们的学校就在先生寓所的隔壁，李鸿章先生执意要来我们学校参观。就这样，李鸿章先生穿着他的中国服装、头上带着辫子来到了我们学校。他为人非常之和霭可亲，允许我们用摸他的衣裳以及他的辫子。

Sciinte ke S-ro Li Hung-Ĉan apartenas al la flava raso, mi kaptis lian manon kaj per palpo penis trovi la diferencon inter la blanka kaj flava koloroj. Post kelkaj minutoj mi demandis al la instruistoj: “Ĉu S-ro Li estas vere flava homo?” La instruistoj diris jes.

听说李鸿章先生是黄种人，我抓住了他的手，想用摸的方法找出白皮肤和黄皮肤颜色上的差别。过了几分钟，我对老师们问道：“李先生真的是黄种人吗？”老师们回答说是的。



“Sed mi ne povas trovi ian diferencon inter la blanka mano kaj la flava.”

“可我怎么找不出白皮肤和黄皮肤手的区别呀。”

Lapin aldonis: “Se S-ro Li apartenas al la flava raso, certe li devas esti malpli civilizita ol ni, sed al mi ŝajnas ke li estas almenaŭ pli afabla ol nia Miĥail.” (Miĥail estis nia servisto, kiun ni tre malŝatis pro lia malĝentileco.) La interpretisto<sup>8)</sup> diris ion al S-ro Li, kaj li multe ridis, sed post lia foriro mi kaj Lapin estis punitaj pro la malĝentileco al la fremda gasto. Oni permesis al ni nenion manĝi, ĝis ni estis komprenintaj nian malĝentilecon. En la fino<sup>9)</sup> de la sama tago ni komprenis tion ĉi kaj estis permesitaj iri kun aliaj por vespermanĝo.

拉宾又加了一句：“如果李先生是黄种人，他一定不如我们开化。可是我似乎觉得，他至少比我们的米哈依尔要和霭可亲多了。”（米哈依尔是我们的校工，因为态度粗暴而令大家感到厌恶）。随行的翻译把我们的话告诉了李鸿章。他笑了好久。可是，等到他走了之后，我和拉宾二人由于对外宾出言不逊而受到处罚。不让我俩吃任何东西，直到我们认识错误为止。当天黑的时候，我们认识到自己的错误，这才被允许和大伙一道去吃晚饭。

Survoje<sup>10)</sup> al la manĝejo mi diris mallaŭte, klininte min al Lapin, ke la manoj de l' flava S-ro Li Hung-Ĉan estis pli agrablaj por tuŝi ol la manoj de nia blanka direktoro. Lapin diris al mi ankaŭ en mallaŭta voĉo, ke li pensas S-ron Li Hung-Ĉan esti ne nur pli afabla ol nia Miĥail, sed ankaŭ<sup>11)</sup> pli civilizita ol niaj blankaj instruistoj.

在去食堂的路上，我低头对拉宾悄悄地说，黄种人李鸿章先生的手，摸起来比白种人校长的手要舒服多了。拉宾也对我悄悄地说，他认为李鸿章先生不仅比我们的米哈依尔要和霭可亲，而且比我们的白种人老师们更加文明。

En la manĝejo nia instruisto ordonis al mi kaj Lapin stariĝi kaj demandis: “Nun do diru antaŭ ĉiuj, pri kio vi murmuris irante tien ĉi?” Elpensi mensogon rapide ni ankoraŭ ne povis tiam, kaj balbutante timeme, ni diris ĉion. La instruisto tre koleriĝis, li ordonis al ni stari genue sur malvarma ŝtona planko kaj diris ke li ne permesos al ni leviĝi, ĝis ni komprenos klare niajn erarojn.

在食堂里，我们的老师命令我和拉宾站着，问我们二人：“现在当着大伙儿的面讲清楚，刚才在路上你们俩都嘀咕了些什么？”我俩已经来不及现编谎话，于是忐忑不安又结结巴巴地供出了一切。这使得老师勃然大怒。命令我俩

跪在冰冷的石板地上，还说，直到我们认清自己的错误之前，不许起身。

Nenion manĝinte de frua mateno, ni baldaŭ komprenis niajn erarojn. Ni rememoris ĉion malbonan aŭ strangan kion ni ĉiam<sup>12)</sup> aŭdis de niaj instruistoj pri la ĉinoj, kaj metinte ĉion sur la ŝultrojn de kompatinda Li, ni komencis alterne: “Certe Li Hung-Ĉan<sup>13)</sup> estas malpli civilizita kaj malpli inteligenta ol niaj blankaj instruistoj, ĉar li vestas sin per stranga virina jupsimila vesto;<sup>14)</sup> li portas ridindan harligon; kiam li estis malgranda li metis siajn piedojn en malgrandajn lignajn ŝuetojn por fari siajn piedojn por ĉiam malgrandaj...

从一清早就没有吃任何东西，我们很快就认识了自己的错误。我们还回忆起老师们对我们讲过的中国人的种种恶劣的怪习。于是就一古脑地全都加到可怜的李鸿章先生的头上。我俩开始轮流着说：“这李鸿章一定比我们的白人老师愚昧落后多了，因为他居然穿着奇形怪状女人裙子一样的衣服，头上打着可笑的辫子，小的时候把自己的脚硬塞到小木头鞋子里面，为的是使自己的脚变得越来越小……”

Nia samklasano kriis: “Sed tion ĉi faras nur ĉinaĵ knabinoj.” Lapin tute ne balbutante respondis:

“La sama afero; se Li Hung-Ĉan estus la knabino, li certe farus tion ĉi.”

同班同学们喊道：“可是只有中国女孩子才那样做吧。”拉宾一点也不口吃地回答说：“李鸿章如果是女孩子，也一定那样做的。”

Nia samklasanino ekkriis: “Sed nenia knabino, mi pensas, metas siajn piedojn memvole en malgrandajn ŝuetojn; tion ĉi igas ilin fari iliaj gepatroj.” Lapin respondis ne venkeble: “Se knabinoj estus siaj gepatroj, ili farus la samon.” Ĉiuj ridis, kaj mi daŭrigis kalkuli la pruvojn de malcivilizeco de S-ro Li Hung-Ĉan: “La instruisto diris al ni ke la ĉinoj estas la hebreoj de l’ oriento; certe Li Hung-Ĉan estas ankaŭ hebreo de l’ oriento. Li Hung-Ĉan pensas nur pri sia propra profito, li amas monon pli ol ĉion en la mondo, por la mono li vendas ĉion kaj ĉiujn...”

有一位同班女同学喊道：“我想，没有任何女孩子会自愿把脚放进小木鞋子里面去。那都是爸爸妈妈强迫的。”拉宾不服输地说：“如果女孩子们是自己的父母亲，她们也会做同样的事。”大伙儿都笑了。我接着罗列证据，证明李鸿章的愚昧落后：“老师对我们说过，中国人就是东方的犹太人。李鸿章一定也是东方的犹太人。李鸿章一心只想自己的利益。他贪

财胜过爱世上的一切。为了钱财，他可以出卖一切东西和所有的人...”

Nun Lapin reinspiriĝis: “Se hebreoj vendis Kriston por la tridek arĝentaj moneroj, sendube la orienta hebreo Li Hung-Ĉan vendus Kriston por tridek kupraj moneroj, se neniu donus pli.” Ĉiuj reekridis kaj ni, entuziasmigite per tio, daŭrigis: Li Hung-Ĉan ŝatas rigardi turmentojn kaj ekzekutojn de krimuloj sur publikaj placegoj; li havas multajn edzinojn; li amas nur siajn filojn kaj tute ne zorgas pri filinoj; se filo naskiĝas li ĝojas kaj festas la tagon, se filino naskiĝas li malĝojas; li rajdas sur homoj; li trinkas teon sen sukero; por sia matenmanĝo Li Hung-Ĉan havas nigran katon, por la tagmanĝo li havas blankan hundidon kaj vermojn, por la vespermanĝo li havas musetojn en mielo; kaptinte pedikon, li frakasas ĝin inter siaj dentoj...”

这时拉宾又得到灵感，接着说：“如果犹太人为了三十个银币可以出卖耶稣，那么东方犹太人李鸿章为了三十个铜板（只要无人开更高的价）他也会出卖耶稣。”大伙儿又都乐了。我俩也就更加起劲地继续往下说道：李鸿章喜欢观看酷刑和犯人在广场上斩首示众。他有许多老婆，他重男轻女，只爱儿子不喜欢女儿。生了儿子他会高兴庆祝，生了女儿他会难过伤心；他骑在别人背上；他喝茶不加糖；李鸿章

早餐吃黑猫；中午吃白狗崽加蛆；晚餐吃老鼠蘸蜜；捉到虱子后，他会在牙齿间咬出必剥的响声……”

“Sufiças,” kriis la instruistoj ĵetante siajn kulerojn; kelkaj komencis vomi. Ni estis pardonitaj kaj permesitaj manĝi nian vespermanĝon. Ĉiuj ridegis ĝoje, sed ni sidis malĝoje. Larmoj falis en nian supon kaj ni eĉ ne volis ĝin tuŝi. “Vi estas pardonitaj, pri kio do vi ploras?” demandis kelkfoje la instruistoj. Sed ni nenion respondis al ili; unu instruisto, vidinte ke ni tute ne tuŝas la manĝaĵon, iom maltrankviligite venis al ni, kaj demandis: “Kio okazis al vi, pro kio vi ne manĝas kaj nur ploras?” Lapin respondis: “Nun ni mem punis nin sen la manĝaĵo, ĉar ni estis tre malbonaj kaj maljustaj al la flava S-ro Li Hung-Ĉan.” La instruisto nenion diris.

“够了！”老师们扔掉了自己的匙子叫了起来，有几位开始呕吐。我俩被赦免了，允许吃晚餐。全体哄堂大笑，可是我俩难过地坐着。眼泪落进了我们的汤里。我们一口也不想动它。“你们已经被原谅了。还哭什么呢？”老师们这样问了我们几次。可我们没有任何回答。有一位老师，见我们完全不肯进食，感到有些不安，问道：“你们怎么了？为什么只哭不吃？”拉宾回答道：“我们现在是罚自己挨

饿，因为我们对黄种人李鸿章先生太坏、也太不公正了。”老师听了一言不发。

Nokte en sonĝo mi ankaŭ vidis S-ron Li Hung-Ĉan en lia stranga jupo kun ridinda harligo sur lia kapo, sed li estis tiel afabla kaj liaj manoj estis tiel agrablaj por tuŝi.

晚上在梦里，我又看见了李鸿章先生，穿着他奇怪的裙子，头上拖着可笑的辫子。可他是那么和蔼可亲，他的手摸起来是那么舒服。

### III

La instruisto instruis al ni ke en ĉiu lando estas iu por regi ĝin, ĉar lando sen registro aŭ kontrolanto, same kiel lernejo sen deĵora instruisto, ne povas progresi. Ni ĉiuj ridetis, ĉar al ni plaĉis nia lernejo<sup>15)</sup> plej bone, kiam deĵora instruisto estis malsana kaj ni libere povis amuzi nin: kiajn interesajn ludojn ni ludis tiam, kiajn interesajn rakontojn ni aŭdis tiam!

老师教导我们说，每一个国家都要有一个人来统治，因为一个没有统治者或者监督者的国家，就像是没有值班老师的学校一样，是不可能进步的。听到这里，我们大伙儿都露出了笑容。因为我们大家感到最开心的就是值班老师

生病了不来，我们大家可以自由玩耍的时候：那时我们玩的游戏是多么有趣，我们听到的故事是多么吸引人呀！

Vidante niajn ridetantajn vizaĝojn, la instruisto koleriĝis: “Mi diris nenion ridindan, pro kio do vi ridetas? Rideti sen kaŭzo estas pruvi ke vi estas malsaĝaj.” Ni silentis.

看见我们的脸上绽开笑容，老师生气了，说：“我没有讲任何可笑的东西，你们笑什么？无缘无故地发笑证明你们都是些蠢才。”我们不作声了。

La instruisto daŭrigis la lecionon: “Por regi Rusujon ni havas imperiestron kun multekosta krono sur la kapo, kun multekostaj vestoj sur la ŝultroj, kun trono por sidi, kun sceptro por teni en la manoj...”

老师继续训话道：“为了统治俄罗斯我们有皇帝，他的头上载着贵重的皇冠，身穿昂贵的皇袍，有一个宝座供他坐，手上还拿着皇上的权杖……”

Lapin interrompis la instruiston: “Sed se la imperiestro havus nek la kronon sur la kapo, nek la specialan veston sur la ŝultroj, nek la sceptron en la manoj, ĉu iu povus tiam kompreni ke li



estas imperiestro?” La demando estis malsaĝa kaj Lapin devis stari, sed li protestis: “Sed, S-ro instruisto, ni povas vidi nek la kronon multekostan nek la vestojn specialajn; kiel do ni povas ekscii, ĉu tiu ĉi homo estas imperiestro aŭ ne?” La demando estis tre malsaĝa kaj li devis stariĝi genue surplanken.

La instruisto daŭrigis: “Krom la imperiestro, ni havas la nobelaron, ni devas estimi kaj obei nobelojn,<sup>16</sup> ĉar ilia klaso estas alta kaj la nia estas malalta.”<sup>17</sup>

拉宾打断了老师的训话问道：“如果皇帝的头上没有戴皇冠，身上没有披着皇袍，手里没有拿着权杖，有谁能够晓得他就是皇帝呢？”这个问题很蠢，拉宾又得罚站。可是他抗议说道：“老师，我们既看不到皇冠，又看不到特别的皇袍，我们怎么能够晓得这个人是不是皇上呢？”这个问题提得太蠢了。于是拉宾得罚跪。老师继续说：“除了皇帝之外，我们还有一些贵族。我们应当尊敬和服从贵族，因为他们的身份高贵，而我们的身份卑贱。”<sup>17</sup>

Ĉar Lapin staris genue kaj ni havis nenium por demandi malsaĝajn demandojn, unu knabino leviĝis: “Ĉar S-ro Langhof (unu blindulo el nobela familio en nia lernejo) naskiĝis en barona familio, ĉu li meritas pro tio ĉi ian specialan

estimon aŭ obeon?” La demando estis ankaŭ malsaĝa kaj ŝi devis stari.

因为拉宾在罚跪，我们也没有人再提愚蠢的问题。有个女生就站起来问道：“因为朗霍夫（S-ro Langhof）先生（我们学校里面一位出身高贵的盲人）出生于男爵家庭，那么他是不是因此也应该受到某种特别的尊敬和服从呢？”这个问题同样是愚蠢的。提问的这个女生也被罚站。

La instruisto daŭrigis: “Kiel en la lernejo malbonaj knaboj, similaj al Lapin, ĉiam provas embarasi kaj malhelpi la instruistojn per siaj malsaĝaĵoj, same en la lando estas multaj sentaŭguloj, kiuj ĉiam serĉas la okazon por embarasi kaj malhelpi la regnestron per siaj malsaĝaĵoj. Ni nomas tiujn ĉi sentaŭgulojn socialistoj, anarhistoj k. t. p. Ni devas timi tiujn ĉi homojn kaj malami ilin.”

老师继续说道：“就好比学校里会有一些像拉宾那样的坏孩子，总是试图用自己的蠢事来干扰和妨碍老师们一样，国家里也会有许多不良分子，总是找机会用自己的蠢事来干扰和妨碍国王。我们把这些不良分子称之为社会主义者，无政府主义者等等。我们应当害怕和痛恨这样一些人。”

Sed neniŭ el ni iam timis aŭ malamis Lapin, kontraŭe, ni amis lin pli ol iun alian en nia lernejo kaj ni pensis, se la sentaŭguloj en la lando estas tiel bonaj kiel sentaŭguloj en la lernejo, ili tute ne estas timindaj por ni.

可是我们当中从来没有谁害怕和痛恨拉宾。相反，我们喜欢他胜过喜欢学校里的其他任何人。于是我们想，如果国内的不良分子是和学校内的不良分子一样好的话，他们对我们而言根本就一点儿也不可怕。

Baldaŭ post tiu ĉi leciono la granda princo Sergej Aleksandroviĉ, la onklo de la imperiestro Nikolas la II, ekvolis viziti nian lernejon. Li estis, tiun tempon, la generalo-guberniestro de Moskvo. (La plej alta ofico en la distrikto en Rusujo estis la ofico de guberniestro, sed ekzistis du generalo-guberniestroj, unu en Petrogrado kaj la alia en Moskvo. La generalo-guberniestro havis la potencon super civilaj oficoj same kiel super militaj.) Jam antaŭ unu semajno oni komencis preparigi la lernejon kaj la lernantojn al la akcepto de tiel majesta<sup>18)</sup> gasto.

这一节课过后不多久，谢尔盖·亚历山大罗维奇（Sergej Aleksandroviĉ）亲王有意来我们学校参观，他是沙皇尼古拉二世的叔叔，当时担任莫斯科的总督。（俄罗斯地方长官的最高官

衔是省长，可是另外有两位总督，一位是彼得堡的，另一位则在莫斯科。总督的权力兼管民事和军事。) 亲王造访的一个星期之前学校和学生们就开始了种种准备，以便迎接如此显赫的贵宾。

Policianoj kaj soldatoj plenigis nian lernejon, korton kaj ĉiujn stratojn en la ĉirkaŭaĵo. Oni timis ke anarhistoj aŭ revoluciistoj povos ataki la princon sur la vojo al la lernejo. (La granda princo Sergej Aleksandroviĉ estis mortigita per bombo de unu anarhisto du aŭ tri jarojn post tio.)<sup>19)</sup>

军警们布满了我们的学校、院子以及周围所有的街道。怕的是无政府主义者或者革命党人会在通往学校的路上对亲王进行袭击。(后来谢尔盖·亚历山大罗维奇亲王被一个无政府主义者用炸弹炸死，是发生在两三年以后的事情了。)<sup>19)</sup>

La fiksitan tagon ĉio estis preta, ni atendis nur sonorilon por kolektiĝi en la granda halo. La sonorilo eksonoris dekkvin aŭ dudek minutojn antaŭ la fiksita tempo.

到了那一天，一切都已准备就绪。只待一声集合铃响，我们就会来到大厅恭候。集合铃声应当在预定的时间提前十五到二十分钟响起。

Pensante ke la servisto faris tion ĉi pro troa fervoro, mi tute ne rapidis iri la halon kaj nur post dek aŭ dekkvin minutoj eliris el nia dormoĉambro. Sur la vojo al la halo min haltigis iu nekonata homo, li demandis min: “Kien vi iras?” Mi respondis: “Mi iras la halon, kie ni atendos alvenon de la onklo de la imperiestro.” Li redemandis, ĉu mi jam tagmanĝis, mi diris jes; kaj li redemandis: “Ĉu la tagmanĝo estis bongusta aŭ ne?” “Se ĝi ne estus bongusta, ĉu vi volas doni al mi alian tagmanĝon pli bongustan?” demandis mi. “Jes, kial do ne?” respondis la nekonato. “Tiam vi devos doni al mi ĉiutage la tagmanĝon kaj vespermanĝon ankaŭ, ĉar ĉiutage la tagmanĝo kaj vespermanĝo estas tre malbongustaj.” La nekonato ridis: “Ĉu al vi povas plaĉi homo, kiun vi ne vidas?”<sup>20)</sup> demandis li. “Certe, mi ne vidas miajn amikojn, sed mi amas ilin tre multe.” “Ĉu mi plaĉas al vi?”<sup>21)</sup> “Mi ne konas vin, sed eĉ se mi ekkonus vin, vi ne plaĉus al mi.”<sup>22)</sup> Sed mi havas nek tempon nek deziron por paroli kun vi, ĉar la onklo de la imperiestro tuj devos veni.” Dirante tion ĉi, mi foriris la halon. Oni diras ke dum tiu ĉi konversacio la instruistoj paliĝis, ruĝiĝis: la nekonata homo, kiu parolis kun mi, estis la granda princo mem; per movo de sia mano li malpermesis al iu ajn intermiksi nian

konversacion. Post la forveturo de la granda princo mi estis metita specialan ĉambron kaj oni konsiliĝis pri mia forpelo el la lernejo. “Kiel vi kuraĝis paroli tiel malĝentile?” demandis min severe la instruistoj. “Sed mi neniam pensis ke tiu homo estis la princo.” “Kial do ne? Se vi ne povis vidi lian belegan uniformon, se vi ne povis vidi sur lia brusto brilantan ordenon, kiun havas neniun en Rusujo krom li, vi certe povus senti lian majestecon: apud li staris du altegaj ĉerkesaj korpogardistoj; (ĉerkeso estas unu kaŭkaza gento; ili estas rimarkindaj pro sia honesteco, forto kaj braveco. La persono de imperia familio ĝenerale elektadis siajn gardistojn el tiu ĉi gento.) malantaŭ li staris liaj multaj leŭtenantoj kaj adjutantoj, se vi ne povis ĉion tion vidi, vi certe povus tion senti.”

想到校工在作这件事的时候热心过头，我根本就不急着赶到大厅里去。而是又过了十到十五分钟，才从寝室出发。在去大厅的路上，有一位陌生人拦住了我的去路。他问我：“你要到哪里去？”我回答说：“我要到大厅里去等候皇帝的叔叔。”他又问我吃过午餐没有。我说吃过了。他又问道：“午餐的味道好不好？”我反问道：“如果它味道不好，您愿意给我更好吃的午餐吗？”“是的，为什么不呢？”这位陌生人回答我。“那么您还得每天给我提供午餐和晚餐。因为我们每天的午餐和

晚餐味道糟糕极了。”这陌生人笑了，问我：“你能够喜欢你看不见的人吗？”<sup>20)</sup>“当然，我就看不见我的朋友，可是我非常爱他们。”“你会喜欢我吗？”<sup>21)</sup>“我不认识您。可就算是我认识了您，也不会喜欢。但是现在我既没有时间也不想和您再谈下去，因为皇叔马上就要来了。”说完这话，我走开到大厅去了。后来别人告诉我，就在我作这样的对话时，老师们脸上是红一阵白一阵：因为和我交谈的，正是亲王本人。他用手势禁止任何人打断我俩的对话。亲王离开之后，我被带到一个特别的房间里。他们开始讨论要把我从学校开除的问题。老师们严厉地问我：“你怎么敢这么无礼地讲话呢？”“可是我万万没有想到那个人就是亲王本人呀。”“为什么没有想到？就算你不能看到他华丽的衣裳，就算你不能看到他胸前显赫的勋章（在俄罗斯除了他再也无人能有那样的勋章），你也该感觉他堂皇的气势呀：他的身边站着两名身材魁梧的契尔吉斯 *čerkesaj* 的保镖（契尔吉斯 *čerkeso* 是高加索的一个种族，以其正直、强壮和勇敢闻名于世。皇族诸人通常喜欢从这一族人中挑选自己的保镖。）他的身后簇拥着他的许多校尉和副官。就算是你看不到这一切，你也一定该能够感觉得到。”

“Ne, mi nenion sentis, mi pensis ke la nekonato estis unu el la policianoj, kiuj pro la okazo

plenigis nian lernejon kaj korton kaj kiuj estas tiel malsimpatiaj.”

“不，我什么也没有感觉到。我以为这个陌生人只不过是众多警察中的一员。当时他们挤满了我们的学校和院子，令人很是反感。”

La instruistoj pardonis min, ĉar mi baldaŭ komprenis la grandecon de mia kulpo; nur mia amiko Lapin diris, ke se la princo havus eĉ la multekostan kronon sur sia kapo kaj la sceptron en la mano kaj alkondukus kun si la tutan gvardion el Petrogrado, li tamen neniam povus pensi lin esti la princo, sed ĉiam pensus ke li estas nur senceremonia fiera soldato.

因为我很快就明白了我犯错误的严重性，老师也就宽恕了我。只有我的朋友拉宾还在说：就算是亲王当时头上戴着王冠，手里拿着权杖，身边带了从彼得堡来的全部卫队，他也不可能想到这就是亲王，而只会以为是那些傲慢无礼的士兵中的一员。

## IV

Kiel mi jam diris, nia lernejo estis tute izolita de la tuta mondo, sed unu fojon en ĉiuj du semajnoj la instruistoj kun la helpo de servistoj havis



kutimon konduki nin al publika ŝvitbanejo, kiun oni luis speciale por ni du aŭ tri horojn.

前面我已经说过，我们的学校是完全与世隔绝的。不过，每两个星期有一次，老师们在校工的协助下，把我们带到公共的桑拿澡堂里去洗澡。为了我们洗澡学校会把这澡堂子全包下来两三个小时。

Unu fojon sur tia vojo al la ŝvitbanejo mi kaj mia amiko Lapin, malrapidiginte niajn paŝojn, restis dudek aŭ tridek futojn malantaŭ la regulaj vicoj de la lernantoj. La instruistoj kaj servistoj, rigardante ĉiam nur antaŭen, ne notis tion. Pasante tiel tra strato duope kun mia amiko, mi estis subite haltigita per demando: “Karaj knaboj, ĉu vi scias kien oni kondukas vin?” Tute senvole ni prenis nian ĉapelon for de la kapo, kaj salutante respektite la nekonaton, ĝentile respondis: “Jes, respektinda sinjoro, la instruistoj kondukas nin al ŝvitbanejo.”

有一次，在去澡堂的路上，我和我的朋友拉宾放慢了脚步，走得比大队伍要落后了二三十步。因为老师和校工们通常只往前看，就没有注意到我们。正当我们这样在街上走着的时候，突然我被一个人挡住了问道：“亲爱的孩子们，你们可知道现在被带到哪里去吗？”我们不假思索地从头上摘下了帽子，向这个陌

生人行礼并且恭敬地答道：“是的，尊敬的先生，老师们带我们去桑拿澡堂。”

La nekonato ridis enigme kaj demandis: “Por kio? Por ĝi vin ŝviti?”

这陌生人神秘地笑了，又问道：“是吗？为什么要让你们去澡堂呢？”

“Jes, respektinda sinjoro, por ke ni povu nin lavi, ĉar du semajnoj, la instruistoj diras, estas tute sufiĉaj por malpurigi la korpon.” “Kaj kiom da semajnoj, diras viaj instruistoj, sufiĉas por malpurigi la spiriton?” demandis nin la nekonato. Ni respondis: “La instruistoj ankoraŭ ne diris al ni pri tio.”

“是的，尊敬的先生，是为了让我们洗澡。老师说，两个星期下来，足够让我们的身上变脏的了。”这陌生人又问道：“那么，你们的老师可曾说过，要几个星期可以让你们的灵魂变脏呢？”我们回答道：“老师还没有对我们讲过这一点。”

Li ree ridis kaj demandis: “Ĉu vi scias ke tre ofte eĉ unu minuto estas tute sufiĉa por malpurigi la homon?”

他又笑问道：“你们可晓得，常常是只要一分钟就足以弄脏一个人哩？”

“O, jes, respektinda sinjoro, dum la kota vetero, elirante el la domo en nian ĝardenon, ni tuj malpurigās, ĉar kion ajn ni tuŝu, kie ajn ni paŝu, ni trovas nur la koton kaj malpuraĵojn, sed la instruistoj tiam nur punas kaj insultas nin, ili ne kondukas nin al la ŝvitbanejo tiam.”

“哦，是的，尊敬的先生，在泥泞的天气里，我们从房间走向花园时，我们会很快变脏。因为不管我们走到哪里，不管我们碰到什么东西，都会是泥泞不堪。可是老师们那时只会责骂我们，而不带我们去澡堂子。”

Aŭdinte tion ĉi, la nekonato diris: “Ĉie nun estas kota vetero, kien ajn ni paŝu, kion ajn ni tuŝu, ni nur malpurigas nin kaj la instruistoj ne gvidas nin al la banejo por nin lavi, sed insultas kaj punas nin.”

听到这里，这陌生人说：“如今不管我们走到哪里，到处都是泥泞的天气；不管我们碰到什么，都会把我们弄脏。老师们不带我们去澡堂清洗，而只是责备和处罚我们。”

Estis la fino de aŭgusto: la vetero estis belega kaj jam dum du aŭ tri semajnoj ni havis nenian

pluvon kaj la paroloj de la nekonato pri la kota vetero estis por ni tute ne komprenataj.

这时正是八月底：天气好的不得了，已经有两三个星期没有下过一滴雨。因此对这位陌生人说的泥泞天气，我们完全不能理解。

Kelkaj homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ni, kaj vidante niajn nenion komprenantajn vizaĝojn kun duon-malfermitaj de miro buŝoj, ili komencis ridi. Tiun saman tempon unu instruisto kun du servistoj alkuris rapidege al ni; batante nin je niaj vangoj, li kriis furioze: “Vi estos kruele punitaj; kiom da fojoj mi diris al vi neniam paroli kun almuzuloj, kaj vi faras tion ĉi sur la strato antaŭ la tuta publiko! Pro kio vi staras sen ĉapelo antaŭ tiu ĉi malpura sentaŭgulo? Ho, nekorekteblaj blindaj diabloj!”

Kriante tiel, li kun la servistoj tiris nin plej kruele al la vicoj de la aliaj lernantoj.

有几个人在我们身边围拢过来。看见我们张口结舌啥也不懂的面孔，他们开始笑了。就在这个时候，有一位老师和两个工友向我们飞快地跑了过来，一边扇我们耳光，一边发疯似的高喊：“你们会受到严惩！我跟你们说过多少回了，永远都不要和叫花子交谈，可是你们却在大街上、当着众人这样做！你们为什么要在这

样脏兮兮的无赖面前脱帽致敬？哼，真是改不了的瞎鬼！”

就这样高声地嚷着，他和工友用最野蛮的方式把我们从学生队伍里拖了出来。

En la ŝvitbanejo la instruisto vokis nin en apartan ĉambron, li prenis vergon kaj diris ke li punos nin plej severe, ĉar ni malhonoris nian lernejon. Li diris: “Kion diros Moskva publiko, se oni ekscios ke la lernantoj de la nobla blindullernejo parolas kun malpuraj almozuloj en la strato? Kion oni pensos pri la instruistoj de la lernejo? Kaj tiu almozulo! Li estis la plej terura, kiun iam ajn<sup>23)</sup> mi vidis en mia vivo: kun malpuraj longaj ungegoj, kovrita per malpura ĉifonaĵo, kun longa barbo, kun tute konfuzitaj kapharoj, kaj de l’ kapo ĝis nudaj sangitaj piedoj nigra de multego da puloj...”

到了澡堂，老师把我们叫到一个单独的房间。他拿了一根鞭子，说要对我们进行最严厉的惩罚。因为我们让学校丢了大脸。他说：“如果知道了高贵的盲人学校的学生和脏兮兮的乞丐在大街上谈话，莫斯科的公众会怎么想？他们会怎样看学校的老师们？还有那个乞丐！那可是我一生中见过的最可怕的形像：手指甲又脏又长，身上披着污秽不堪的破烂，一大把胡

子，头发乱蓬蓬的，从头顶到流着血的赤脚，  
满是跳蚤……”

La vergo kolere ekflugis en aero kaj eniĝis mian nudan korpon, la alia bato trafis Lapin kaj la tria ree min.

Kunpremite la dentojn, mi ĵuris al mi mem ke mi ĝemos nek unu ĝemon, krios nek unu krion, sed je la dua bato Lapin ekkris: “Sed S-ro instruisto, ni neniam sciis ke tiu nekonato estis tia terura almozulo!”

鞭子愤怒地挥向天空，打进我的裸体；第二下打在拉宾的身上，第三下又打向我。

我咬紧牙关，对自己发誓，一定要一声不响，一声不喊。可是才打到第二下拉宾就喊了起来：  
“老师，可是我们从来也想不到那个陌生人会是那么可怕的乞丐呀！”

“Kiu do li estis, vi pensis?”

“那么你以为他会是谁？”

Lapin respondis en mallaŭta voĉo: “Mi pensis ke li estis unu princo...”

拉宾压低了嗓音答道：“我以为他是位亲王哩……”

Mi aldonis: “Kun iu brilanta ordeno sur la brusto, kiun neniu plu havas en Rusujo krom li.”

我又补充了一句：“他的胸前有枚耀眼的勋章，在俄罗斯除了他以外谁都没有的那种勋章。”

Stranga krio eliris el la gorĝo de l' instruisto; en tiu krio aŭdiĝis al ni ia demando, ia surprizo, ia teruro. La vergo falis el liaj manoj planken. La instruisto, kredeble la unuan fojon kaj povas esti la lastan en sia vivo, ekvidis por unu mallonga momento la malgrandan angulon de la regno de l' nokto kun ĝia princo, de l' kapo ĝis nudaj piedoj nigra de multego da puloj, kun speciala ordeno sur brusto, kiun havas neniu krom li en Rusujo.

从老师的喉咙里发出了一声奇怪的呐喊。在这一声呐喊里我们听到了某种疑问，某种惊讶，某种恐怖。鞭子从他手中落到了地板上。老师在他的一生中很可能是第一次，也可能是最后一次在一瞬间看到了黑夜王国的一角，看到了亲王从头到赤脚布满了黑压压一片跳蚤。同时在他的胸前又戴着一枚在俄罗斯除了他以外谁都没有的特别勋章。

Reveninte el la ŝvitbanejo al la lernejo, ni atendis severan punon, sed la instruistoj diris eĉ ne unu vorton; mi pensis ke ili timis raporti la aferon al la lernejestro, ĉar se li eksciis ke pro malatento de la instruistoj, la lernantoj estis eblaj paroli kun terura almozulo, li certe unue riproĉus la instruistojn.

从澡堂回到回到学校以后，我们等待接受严厉的处罚。可是老师对于发生的事情只字未提。我想他们是害怕把事情报告给校长。因为校长要是知道，由于老师的疏忽大意学生有可能和可怕的乞丐交谈，校长一定会首先责怪老师的。

\*

Por fini tiun ĉi malgrandan skizon, mi devas diri ke la nokto instruis al mi antaŭ ĉio dubi ĉion kaj ĉiujn, ĝi instruis min kredi nek unu vorton de niaj instruistoj, nek unu frazon de kiu ajn aŭtoritato; mi dubis ĉion, mi suspektis ĉiujn aŭtoritatojn; mi dubis la bonecon de la Dio same kiel la malbonecon de la diabloj; mi suspektis la registarojn same kiel la socion kiu fidas ilin.<sup>24)</sup> Sed al aliaj blinduloj la nokto instruis preni ĉion kiel la veron kaj esti trankvilaj. La plej multo de miaj amikoj, kiuj prenis kiel la veron ĉion kion



instruis la instruistoj, kredis ĉian vorton de l' aŭtoritatoj, dubis nenion; tiuj amikoj jam de longe atingis certan situacion en la socio<sup>25)</sup> ĉu kiel muzikistoj, ĉu kiel instruistoj, ĉu kiel laboristoj, kaj vivas komforte, ĉirkaŭite de siaj edzino kaj infanoj, dum mi ĝis nun atingis nenion kaj vagadas dubante ĉion kaj ĉiujn de lando al lando; kaj kiu povas diri ke unu malbenitan tagon mi ne staros en malluma angulo de iu brua strato kiel tiu princo de l' nokto kaj ne etendos la manon al la pasantoj por peti?...

在结束这篇短文的时候，我得说：黑夜教给我的，首先就是怀疑。怀疑一切事，怀疑一切人。黑夜教导我，不要相信我们老师讲的任何一个字，也不要相信任何权威讲的一句話。我怀疑一切。我怀疑所有的官方人士。我怀疑上帝的善良，如同我也怀疑魔鬼的邪恶一样。我怀疑政府，我也怀疑对政府表示信任的社会。可是黑夜教导其他盲人要把这一切当成真理，保持心态的平和。我朋友中的绝大多数人都把老师们教导的一切当成真理，相信官方所说的一切，没有任何怀疑。这些朋友们也都有了一定的社会地位。他们或者是成为了音乐家，或者当了老师，或者当了工人，有了老婆孩子，过着舒服的生活。而我呢，直到现在，还是四处漂泊、一事无成。从一个国家流浪到另外一个国家，怀疑一切人，怀疑一切事。有谁能够说，我不会在某一个被诅咒的日子里，站在喧嚣大

街的某一个阴暗的角落，就像那位黑夜亲王那样，向过路的行人伸出我的手呢？……

### Unu paĝeto en mia lerneja vivo

Teksto: el “La ĝemo de unu soleca animo”.

Varianto: en “Unu paĝeto en mia lerneja vivo”, Suplemento al “La Verda Ombro”, marto, 1923. Laŭ la noto de ĝia redaktoro, li ricevis la tekston ne rekte de la aŭtoro, sed pere de Higa syuntyô, esperantisto el Okinavo, tiam loĝanta en Tokio.

Antaŭ la publikigo de la originalo ĝi estis tradukita unue en la ĉinan lingvon kaj due en la japanan.

La ĉina traduko: en “Fabelaro de Eroŝenko”, januaro, 1922, Ŝanhajo, far Hujucz, por kiu Lusin, la ĉina verkisto, kunlaboris tradukante aliajn japanlingvajjn verkojn de Eroŝenko.

La japana traduko: en “Warera” (Ni), junio numero, 1923, Tokio, far Hukuoka seiiti, kiu vizitis Eroŝenkon loĝantan en la hejmo de Lusin kaj ĉi ties frato Zhou Zuoren en Pekino en aprilo, 1923.

- 1) l' brila sunlumo: *grandlumo* (V)
- 2) dum mi spiras: *ĝis kiam mi spiros* (T, V)
- 3) 3)Hawkes: Clarence Hawkes (1869-?), usona sciencisto. Lia ĉefverko, "The Hitting of the Dark Trail" eldoniĝis en 1915.
- 4) tion ĉi: *la samon* (V)
- 5) havigi al si: *haviĝi* (T, V)
- 6) fama tea kompanio, kiu enportas en Rusujon la teon: *fama rusa tea kompanio en Ĥinuĵo kiu enportas en Rusujon la teon* (T); *fama kompanio kiu en Rusujon elportis la teon* (V)
- 7) Li Hung-Ĉan: Li Hongzhang (1823–1901), ĉina politikisto kaj militisto, kiu subskribis la armisticon de Japan-Ĉina Milito en Simonoseki, 1895.
- 8) interpretisto: *tradukisto* (T, V)
- 9) En la fino: *Al la fino* (T, V)
- 10) Survoje: *Laŭ-voje* (T, V)
- 11) sed ankaŭ: *sed li pensas ke Sro. Li Hung-Ĉan estas ankaŭ* (T, V)
- 12) ĉiam: *kiam ajn* (T, V)
- 13) Li Hung-Ĉan: *Sro. Li Hung-Ĉan* (T). Ni forprenis nekonvenajn "Sro"-jn laŭ la varianto.
- 14) jupsimila vesto: *jupo* (V)
- 15) al ni plaĉis nia lernejo: *ni plaĉis nian lernejon* (T, V)
- 16) obei nobelojn: *obei al nobeluloj* (T, V)
- 17) ilia klaso estas alta kaj la nia estas malalta: *ili estas alta klaso kaj nia estas la malalta* (T, V)

18) majesta: *Aŭgusta* (T, V). Verŝajne anglisma aŭ pli ĝenerale eŭropisma esprinio.

19) Sergej Aleksandroviĉ: Li estis mortigita en 1905 de unu Social-Revoluciisto.

20) Ĉu al vi povas plaĉi, kiun vi ne vidas? : *Ĉu ne vidante homon vi povas plaĉi lin?*(T, V)

21) Ĉu mi plaĉas al vi? : *Ĉu vi plaĉas min?*(T, V)

22) vi ne plaĉus al mi: *mi ne plaĉus vin*(T, V)

23) iam ajn: *kiam ajn* (T, V)

24) la socion kiu fidus ilin: *fidintan ilin societeton* (T, V)

25) socio: *societo* (T, V)

(Mallongigo)

T: tiel en la teksto, kiun ni alprenis.

V: tiel en la varianto, kiun ni referencis.

Noto de Guozhu: Kiel konate, la unua ĉinigo por tiu ĉi artikolo estas farita de S-ro Hujucz en 1923. Bedaŭrinde ni ne povas trovi tion interrete.

En 1983 Guozhu ankaŭ faris ĉinigon por la lernolibro de la Daŭriga Kurso de Koresponda Esperanto- Kurso. Sed la lernolibro nun ankaŭ ne plu havebla. Do tiu ĉi ĉinigo fakte aperas kiel la tria en Ĉinio 2010.

eFolio de Guozhu eroŝenko01